

## ANTAŬPAROLO

---

La komuna uzado de " Esperanto ", jam longdaŭra, klare pruvis, ke tiu lingvo, en sia nuna stato, plene sufiĉas por la korespondado internacia ; sed, nuntempe, oni devas peni por ĝin perfektigi kaj riĉigi, rilate al ĉiu speciala fako de la homaj konoj. Efektive, por la scienculoj ĉiulandaj, la L. I. povos fariĝi utila nur, kiam ĝi enhavos la vortojn teknikajn bezonatajn.

Sed tio estas grava entrepreno, kaj komence laboro de la nuraj diverslandaj specialistoj, kiuj, laŭ komuna interkonsento, devos verki specialajn vortarojn en ĉiu fako. Nur tiam oni povos eldoni Esperantan ĝeneralan Vortaron, sufiĉan por la artoj, sciencoj, komerco kaj industrio.

La vortoj, kiuj estos elektitaj de la verkontoj, devas, pro la plena ĝusteco, ricevi aprobon de la ĉiulandaj teknikuloj ; tio komprenigas la malfacilecon, kaj ankaŭ la indecon de tiaj verkoj.

Laŭ tiela metodo estas verkita la ĉi-tiu " Profesia Terminaro naŭlingva " kiu estas unu el la ĉefaj dokumentoj de tiu-ĉi verko laŭ lingva vidpunkto. Laŭ praktika vidpunkto, la ĉiulandaj Farmaciistoj trovas en ĝi aron da sciigoj kaj formuloj el diversaj Farmakopeoj, kiuj certe faciligos ilian laboron, en multaj okazoj, kiam ili havas por *prepari receptojn de eksterlanda deveno*. Ĝi estas verko konsciencplena, kiun oni povas certe rekomendi por la imito. La aŭtoro ĝin faris kun la helpo de Farmaciistoj de nia Grupo, lertaj en sia profesio (ĉar eksinternuloj de la Parizaj Hospitaloj), kaj plie tre lertaj Esperantistoj ; ili nur ekstraktis la fakon " Farmacio kaj Drogoj de animala aŭ vegetaja deveno ", ĉar la Ĥemio necesigos, pro ĝia vasteco, apartajn vortarojn.

Tiu-ĉi libro, kvankam nome speciala, povos tamen eniĝi la bibliotekon de ĉiu klera Esperantisto ; ĉar la plimulto el la farmakologiaj vortoj estas ĉiutage uzataj en la komuna lingvaĵo.

La plano por prilabori internacie tiun verkon estas elpensita de S<sup>ro</sup> C. Rousseau. Ĝi estas unuvoĉe aprobita de liaj kolegoj de " Franca Medicina Esperantista Grupo " en la Jaro 1905, dum la laboraj kunsidoj de la Grupo ĉe la Medicina Fakultato Pariza, kaj poste publike prezentita de li mem ĉe la 3<sup>a</sup> Kongreso de Esperanto, en " Cambridge " (titole Metodo GEM.). Tiu labormetodo estis priskribata en gazeto " Internacia Scienca Revuo " okt. 1907 (1).

Post tiu konvinkanta eksperimento, ni povas konsili la saman metodon al ĉiuj prilaborantoj internacian profesion verkon.

DOKT. ROBLOT †

Sekr. de " Franca Medicina Esperantista Grupo ".

---

(1) Konkludo de la aŭtoro pri "Metodo GEM" . . La vortaroj faritaj laŭ tiu metodo enhavas du apartajn fakojn : 1<sup>o</sup>) Vortaro Esperanto-Nacilingvoj, kun klariga teksto, ekzemploj... 2<sup>o</sup>) Aro da nacilingvaj vokabularioj ; ĉiu el ili konsistas el Alf. nomaro da nacilingvaj vortoj, kies esperantan tradukon oni trovas en la unua parto, dank'al la ekkonaj ciferoj.

Tia vortaro estas do uzebla :

1<sup>o</sup>) Por traduki nacilingven verkon originale verkitan en Esperanto (dank'al la 1<sup>a</sup> parto).

2<sup>o</sup>) Por traduki Esperanten verkon skribitan en ia nacilingvo (dank'al la nacilingvaj alf. nomaroj).

3<sup>o</sup>) Plie, ĝi taŭgos al ĉiulandaj ne-Esperantistoj por trovi la sencon de teknika termino, en lingvo alia ol la sia.

Tia vortaro estas vere internacia.